# « Le Groupe Esperanto du Maine » salutas vin !

## *Bonvenigaj vortoj*

Jen nia freŝnaskita loka bulteno. Nun ĝi estas nur tripaĝa kaj eble ĝi kreskos laŭ la eventoj.

## *Enhavo*


- Bonvenon
- Sarta esperanta historio
- La monata Zeo
- Kio nova en nia retejo ?
- Lokaj aktualaĵoj pri Eo
- Nia kuir-recepto


## *La monata Zeo*

En la fejsbuka grupo : ***ZEO-j***
Zamenhof kaj Esperanto Objektoj
Jen kion ni proponis en februaro 2022.
Aliaj baldaŭ sekvos…




*Inaŭgurita : decembro 1960 en Le Mans*

## *Sarta historio pri Esperanto*

En marto 1908 aperis la revuo « Sarta Stelo » de la Esperanta Sarta Grupo kiu naskiĝis en 1907. Tuj ĝi decidis eldoni etan revuon en la franca por klarigi la celon de Eo, kaj prezenti siajn aktualaĵojn.



1re Année. — N° 1. ★ Mars 1908.

SARTA STELO

Bulletin Mensuel
DU GROUPE ESPÉRANTISTE DE LA SARTHE
(Ne paraît pas en Août et Septembre)

| INSCRIPTIONS AU GROUPE | | ABONNEMENT AU BULLETIN, 1 an.... 1 fr. |
|---|---|---|
| Membres Actifs, cotisation annuelle | 2 fr. | Pour les Abonnements et tout ce qui concerne la Rédaction et l'Administration du présent Bulletin, s'adresser à M. LEPELTIER, rue Scarron, 14, Le Mans. |
| — Honoraires, — | 5 fr. | |
| — Bienfaiteurs, — | 20 fr. | |

NIA CELO — NOTRE PROGRAMME

Ne serait-il pas superflu de rappeler ici toutes les causes qui militent en faveur de l'adoption d'une langue internationale. Si cette langue existait en effet, tout ce que produit de beau et d'intéressant la pensée humaine, pourrait être traduit dans cette langue, rendue neutre, ou même y être écrit directement. Tous les beaux fruits de notre civilisation, la haute culture de l'esprit humain ne sont dus qu'à une longue suite de travaux et d'efforts individuels et notre *langue*, indispensable à l'échange des idées, a été l'auxiliaire nécessaire à l'obtention de ces résultats.

Mais la vie est courte et le champ de la science est si grand, qu'on peut dire qu'il est sans limite ; or, réfléchissons y bien, que de temps précieux perdons-nous à l'étude des différentes langues, sans résultats bien appréciables. Par contre, que d'avantages pour tous, si nous pouvions, au moyen d'une unique langue seconde, profiter des efforts et des travaux de milliards d'êtres semblables à nous.

En nous plaçant au point de vue de l'expansion des idées pacifistes, nous voyons les hommes généreux qui en sont les fervents pionniers rêver, eux aussi l'adoption par tous les peuples, d'une langue universelle.

Il faudrait d'autre part, rester étranger au mouvement des affaires en ce moment où son activité est si intense, pour ne pas se laisser emporter par le même rêve et ne pas reconnaître l'intérêt primordial qu'une telle langue offrirait au monde civilisé, au point de vue industriel et commercial.

Eh bien ! cette langue de rêve, qui serait pour l'humanité tout entière, d'une si incontestable utilité existe, non seulement en théorie, mais en fait. Une langue simple, souple, aussi pratique qu'ingénieuse, harmonieuse même, et

Elŝutu la plenan PDF-on en nia retejo

## *Kio nova en nia retejo ?*

Esperantolemans.org

La Ĉarto « DIVERSECO ESTAS FORTO »



# *Lokaj aktualaĵoj pri Eo*

***Fest'Ile Le Mans, aranĝo en 2021 kun kaprica vetero***



*« Fest'Ile » estas la jara festo de la Okcidentaj kvartaloj de Le Mans, organizata de La Socia Centro Simone Veil.*
*Ĉiujare, ĝi estas instalita sur « l'Ile aux Planches », « la Insulo je Tabuloj » por gastigi familian publikon kaj preterpasantojn laŭlonge de la rivero Sarta.*
*Ĉe unu el la du enirejoj de la loko stariĝas la statuo « l'Envol », « la Ekflugo » omaĝe al la pioniroj de aviado en departemento Sarto kaj ĉe la alia enirejo la vizitanto povas admiri pentritajn freskojn sur la eksa Tabak-fabriko.*



*Post la aranĝo en 2020, sub la antaŭaverto de baldaŭa trudizoliĝo, tiu de 2021 antaŭvidiĝis sufiĉe bone, en malstreĉita etoso, malpli trudpelanta, kvankam la vetero decidis alimaniere, kaj vigle ĝenis la feston.*
*Tamen, matene, dum la instalado de la budoj, la tago komenciĝis trankvile en amika etoso.*
*Prezentado de esperantaj dokumentoj, afiŝado de tradukaĵoj de tri fabloj de « La Fontaine » « Lafonteno », informo pri la proponita migrado dum la venonta semajno. Nia esperanta grupo estis preta por bonvenigi la publikon.*
*Apud nia Esperanta budo lokiĝis « la Sartaj Formikoj », partopreniga asocio de lokaj produktaĵoj.*
*La medio perfektis…*
*« Fest'Ile » ekzistas jam de pluraj jaroj kaj la vigligo riĉiĝas pli kaj pli. « Le Groupe Espéranto du Maine » partoprenas en ĝi ek de la komenco.*
*Tiun jaron, estis pli da asociaj budoj kaj riĉa programo je festo-agadoj : Flamenko, dancoj, teatraj improvizoj, ludoj, legadoj en jurto, arta korpa pentrado, rok bando, kaj « Pinata-o », sen forgesi la viziton de lokaj moŝtuloj, la urbestro kaj lia kunlaboranto pri solidarecoj.*




*Malfeliĉe, forta pluvo ankaŭ invitis sin dum la posttagmezo kaj grave fuŝis la etoson.*
*Adiaŭ al la legado de Fabloj de Lafonteno, des pli malbone por la interŝanĝoj kun la publiko, necesis retroiri funden de la budo por ŝirmi la dokumentojn kaj fine ne esti tute malsekaj.*

*La publiko rapide foriris, la koncerto devis esti fruigita kaj la festo de la kvartaloj ĉesis antaŭ ol planita.*
*Kiel bedaŭrinde !*
*Sed tamen, tiu tago restas momento de rilatfaciligo ŝatita de ĉiuj.*

*Dankegon al la skipo de la Sociala Centro Simone Veil, pro ĝia vigleco kaj afableco.*
*Ĝis venonta jaro…*

# Kuketoj por radiaj matenoj



**Por prepari 24 kuketojn**
125 g da sukero - 4 ovoj - unu pinĉaĵo da salo
1 supkulero da akvo de oranĝ-floro
200 g da faruno - 125 g da butero
1 saketo de levuro

**Preparado**
En granda bovlo
- ŝuti la sukeron.
- meti iun ovon post la alia en la sukeron kaj vigle miksi ĉiufoje.
- aldoni salon, oranĝ-floron, levuron, farunon kaj denove vigle miksi.
- moligi la buteron kaj aldoni ĝin en la preparaĵon.
- plenigi la bakmuldilojn trikvarone per pasto.
- antaŭvarmigi la fornon, ĉirkaŭ 180°.
- baki la paston dum 12 aŭ 15 minutoj, laŭ la forno.

Vi povas anstataŭigi la akvon de oranĝ-floro per pecoj da ŝokolado aŭ sekaj vinberoj, por varigi la guston.

Post la kuirado, meti la kuketojn en fermitan skatolon por konservi ilin molaj dum preskaŭ 8 tagoj.
Servi tiujn kuketojn kun kafo aŭ teo por matenmanĝi aŭ dum la tuta tago !

*El la Gazeto n°51, Oktobro-Novembro-Decembro 2004, Groupe Espéranto du Maine*

*Ĝis baldaŭ…nun printempas …*



Ĉar Esperanto estas lingvo de Paco,
La GEM subtenas ĉiujn viktimojn de militoj

Esperantolemans.org
Esperanto72gem@gmail.com
Groupe espéranto du Maine, 4 rue d'Arcole, 72000 Le Mans Fr